

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## “Muzeo” en preparo, (ĝis marto)

Prepare al la malfermo al samideanoj, multaj volontuloj laboris.

### (1) Alveno de donacitaj libroj kaj materialoj

En la januara numero ni aperigis leteron de s-ro Petr Chrdle el Ĉeĥio. Jes, libroj venis de li. En p.2 de ĉi tiu numero, s-ino Murata priskribas la Gotoo-Kolektaĵon, de eksprofesoro Gotoo Hitosi. Aliaj personoj ankaŭ kontribuis al ni siajn librojn kaj dokumentojn.

### (2) Plimultigo de librobretoj kaj ŝrankoj

Instaliĝis du librobretaroj kun vitraj pordoj, por protekti rarajn librojn, kaj malaltaj ŝrankoj por horizontale stoki malnovajn gazetojn kaj dokumentojn, kiuj devas esti zorge traktataj.

Ankaŭ estas bretaro por vendotaj libroj.

### (3) Instalado de reklamŝildoj

La muzeo alfrontas fervojlinion Keihin-Kyuko, kaj tial oni instalas 2 reklamŝildojn, sur muroj, videblaj momente de la trajnoj. Oni planas instalati reklamŝildon ankaŭ al la veranda muro,

kiu frontas al la vizitantoj paŝantaj.

### (4) Daŭra netigo

Oni plu aranĝis kaj rearanĝis la “trezoron”, ricevitaĵajn librojn, gazetojn ktp, por esti facile troveblaj.



## Niaj klasoj

\*Eseoj: gvidas Doi Hirokaz, en Muzeo, en sabato de 15:00 ĝis 17:00

Oni legas libron “Tamen ĝi moviĝas”.

\*Teksantoj: gvidas Doi Ĉieko, per Zoom, en lundo de 16:00 ĝis 17:00

En aprilo oni finos legi “Joĉjo”, kaj sekvas legado de “Stranga kato”.

\*eriko: gvidas Doi Ĉieko, en Muzeo, en merkredo de 14:00-16:00

De februaro oni legas “La Pordego”, tradukaĵon de japana romano.

\*Jokohama Salono: sen gvidanto, per Zoom, en sabato 15:00-17:00

Principe la 1-an kaj la 3-an sabaton de monato oni legas “La Ŝtona Urbo”. La 2-an sabaton oni prezentas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni prezentas sian tradukaĵon el materialo libere elektita.

\*daŭriga kurso: gvidas Doi Ĉieko, en Muzeo, en merkredo de 16:00 ĝis 18:00

Oni finlegis “Barbro kaj Eriko” kaj legos artikolojn el UEA-organo.



## Pri Gotoo-kolekto

— mia volontula laboro en la Esperanta Muzeo Jokohama —

Murata Kazuyo

La prepara teamo por malfermo de Esperanto-Muzeo Jokohama multe laboras celante la malferman tagon, la 25an de aprilo. Kiel multe da tempo kaj energio ili oferas, mi eĉ ne povas supozi, kaj mi tutkore dankas al ili.

Al nia Muzeo S-ro Gotoo Hitosi donacis la tutan materialon, kiu rilatas al la “Biografia Leksikono de la Esperanto-Movado en Japanio” (2013), finredaktita de li. La donaco okazis pro lia emeritiĝo el Universitato Tohoku, kie li profesoris. Entute 34 ondumitaj kartonaj skatolegoj estis senditaj al Muzeo. En ĝi troviĝas diversaj dokumentoj, kiujn s-roj Shibata Iwao, Mine Yositaka kaj Gotoo Hitosi kolektis dum longa tempo, por redakti la Leksikonon. S-ro Doi Hirokaz, respondeculo de la Muzeo, provizore nomis ĝin Gotoo-Kolekto.

Mi okupiĝas pri ĝi, por listigi la enhavon. En la skatoloj troviĝas diversaj materialoj.

En Japanio komenciĝis esperanta movado ĉ.1906 (Meizi 39). Jam en tiu tempo troviĝis multaj personoj, kiuj interesiĝis pri Esperanto, kaj lernis, informis, disvastigis, instruis, kaj eldonis librojn ktp. La speco de materialoj inkluzivas, ekzemple:

**A.** Gazetoj: La plej valora gazeto estas LA REVUO, kiun Zamenhof redaktis en 1906, entute 86 ekzempleroj troviĝas. (Ili ne estas malnoviĝintaj, dum nekredeble longa tempo pasis; pli ol 100 jaroj)

**B.** Enlandaj gazetoj:

1) gazetoj: de lokaj grupoj en la tuta lando, de Kjuuŝuu ĝis Hokkaido.

2) fakaj gazetoj: ekz. Fervojista, Go-amanta,

Literatura

3) religiaj gazetoj: budhana, kristana, Oomotana,

4) soci-movadaj gazetoj: Virina (EVA), SAT, Paca

C. Revuoj: pri diversaj temoj

Ĉ. Libroj

1) Esperante verkitaj, tradukitaj en la japanan, tradukitaj en Esperanton

2) pri Esperanto

3) memorkolekto por famaj esperantistoj

D. Lerniloj: diversniveleaj lerniloj por lernantoj

E. Vortaroj: E-Japana, J-Esperanta, Alilingva-E

F. Edukiloj:

Por infanoj, por plenaĝuloj, materialoj por kurso

G. Adresaroj por diversaj grupoj kaj asocioj

Ĝ. Kongreslibroj:

1) Por UK kaj aliaj kongresoj eksterlandaj. De la jaro 1911 ĝis 1935.

2) Por Japana E-Kongreso aŭ tiu de la Kansaja Ligo aŭ de Kongreso en Kantoa regiono, ktp

H. Informiloj:

1) la plej malnovaj ĵurnaloj, kiuj informis pri Esperanto en Meizi epoko, antaŭ pli ol jarcento (読売新聞)

2) multaj ĵurnaloj, kiuj informis pri Esperanto

Ĥ. Leteroj de diversaj samideanoj al redaktoroj K.T.P.

Tiel multe da enhavoj interesas mian scivolon, sed nun mi ne havas tempon legi ilin. Ĉar ni devas ordigi ilin laŭeble frue por publikigi. Do mi atendas la tempon, kiam senhezite mi povas legi ilin.

### kadraj personoj en la organizo

En la marta n-ro estis mis-informado. Jena tabelo estas ĝisdata.

La estraranoj por mandato 2021 (kun taskita tereno)

s-ro Sibayama Zyun'iti (Prezidanto, bultenoj)

s-ro Arai Kazuhiro (bultenoj, interreto, kunordigo kun la Muzeo)

s-ino Miyazaki Hideko (eventoj, eduko, kunordigo kun la Muzeo)

s-ro Namba Fumiharu (financo, interreto)

La revizoroj por mandato 2021 (same kiel en 2020)

s-ro Karibe Riiti

s-ro Tanigaŭa Hiroŝi.

## La 120-a Legokunsido

En la 4a de decembro 2020 ni havis la 120-an legokunsidon por "Tradukaĵoj de Japanaj Beletraĵoj" kompilitaj kaj tradukitaj de AIDA Kiyoshi.

### Longe ellaborita kompilverko "Tradukaĵoj de Japanaj Beletraĵoj" kompilitaj kaj tradukitaj de AIDA Kiyoshi

Mizro Iwaya

Lastatempe mi enmanigis al mi titolitan libron. Traleginte ĝin mi trovis ke la enhavo estas sufiĉe ĉarma kaj interesa, kiu kovras la japanan literaturon ĉe la elementa parto. Ĝi estas kolekto de mallongaj noveloj ĉefe infanlibraj. Ĝi estas bona gvidlibro al infanliteraturo japana eĉ al ni, japanoj, kiuj ne bone konas tiun kampon.

La kolektitaj noveletoj estas variaj: foje lecionaj, foje aventuraj, foje fantaziaj. Do mi volas nur prezenti ĉi tie kelkajn el ili.

17. "Ruĝa kandelo kaj marvirino" de Ogawa Mimei

Marvirino naskis filinon. Ŝi estis adoptita al kandelvendistaj geedzoj. Ŝi desegnis bildon sur kandeloj kaj ŝipistoj aĉetis ilin por protekti sin kontraŭ uragano.

29. "Grapolo de vinberoj" de Ariŝima Takeo

Mi tre enviis Ĵim, mian klasanon, pro lia belkolora farbo per kiu li pentris bildon. Iun tagon mi ŝtelis ĝin, sed mia faro estis eltrovita. Ili denunciis min al nia instruistino. Mi nur ploradis kaj ŝi ĝentile konsolis min kaj donis al mi grapolon de vinberoj.

Tiamaniere daŭras sume 37 fabeloj. Estas bedaŭrinde ke oni ne povas facile enmanigi la libron al si, ĉar la eldonkvanto estis tre limigita.



## el Aŭstralio

### Ietero el s-ino Franciska Toubale

Saluton .

Dankon pro la sendado de Novaĵoj Tamtamas. Mi ŝatus reagi al la artikolo de Sibayama Noriko

En la februara numero de Novaĵoj Tamtamas Sibayama Noriko recenzis la libron de Serge Elgo "La aliulo". Mi trovis tiun romanon kortuŝa kaj maltrankviliga. Homo, kiu jam spertis ŝtelĉasadon de alia persono, ĝenerale konata, povas imagi la angoron kaŭzitan de ulo, kiu kapablas konstante eskapi kaj kulpigi alian homon pro siaj fiagoj. Noriko taksas la planon de la rakonto iom stranga. Tio ne estas surpriza kiam oni scias, kiel klarigas Arno Lagrange, la filo, ke kiam George Lagrange forpasis en 2004, lia romano estis nur preskaŭ preta. Arno finpretigis ĝin por ke ĝi estu publikigita.

Ĉu George prezentus ĝin kia ĝi nun estas? Neniam estos respondo al tiu demando .

Franciska Toubale  
Kun koraj salutoj

### 3ZZZ legis niajn artikolojn

#### elsendo de la 15a de februaro

el Novaĵoj tamtamas numero 359 "Amabie, japana folkloro sireno kiu forigas epidemion" de Namba Fumiharu

#### elsendo de la 1a de marto

el Novaĵoj Tamtamas n-ro 360 Tanigaŭa Hiroŝi recenzas la novelon de Waclaw Sieroszewski tradukita de Kabe "La fundo de l'mizero".



## Sopiro al Uzbekio

Aida Yayoi

En la jaro 2005 mi kun mia edzo partoprenis 13 tagojn da vojaĝo al Uzbekio. Alvokite de s-ino Yazaki, reprezentanto de Esperanto-klubo de Hukuŝima, kolektiĝis 19 homoj el tri regionoj de Japanio. Danke al ŝi kaj aktiva esperantisto s-ro Ionesov en Samarkando, ni havis signifoplenajn spertojn ne nur en turismo sed ankaŭ en vizitoj al lernejo, bazono, tombejo de japanaj soldatoj en Taŝkento, laborejo de brodaĵo, eĉ al geedziĝa bankedo invite.

Rigardi la bluan moskeon rekte per miaj propraj okuloj estis mia celo de ĉi-foja vojaĝo. Kiam ĝi efektiviĝis en la dua nokto, kortuŝite mi longe sidiĝis sur la benko en la fama placo Legistan rigardante la altan turon kolorigitan de malhela bluo. Ja finfine mi renkontis Samarkandan bluan! Ovala tegmento kaj kvadrata muro elmontris geometrian desegnaĵon sur la bluo. La moskeoj kaj islamaj maŭzoleoj staris sub briletantaj steloj kaj sentigis min nostalgia al jam malaperinta antikva urbo

de gloro kaj prospero. Al mi parade vestitaj junulinoj por la printempa festo ŝajne reflektis tiaman vizion kun nekredbla beleco.

Ni estis invititaj al mezlernejo. La lernantoj varme bonvenigis nin en uniformo. Por la memorinda tago ili ekzerciĝis en esperantan kanton kaj teatraĵon entuziasme. Emociite ni respondis per kantoj kiel "valso de steloj" k.a. Estis ekspozicio de artaĵoj por amika interŝanĝo de reciproka kulturo. Lernantoj de la urbo Toyota prezentis mem faritajn bildojn. Iu knabo donis al mi uzubekan moneron honteme ridetante. Lanugoj de lia vango tiam ekbrilis. Ho, kiel kara knabo li estis!



desegnaĵoj: Miyazaki Hideko